

Te Deum laudamus

La granda Doksologio, Brevier-Himno

Konstantaj partoj > horo de la legaĵoj > aldona himno

*Te Deum laudamus:
te Dominum confitemur.
Te æternum patrem
omnis terra veneratur.
Tibi omnes angeli,
tibi cæli et universæ potestates,
tibi cherubim et seraphim
incessabili voce proclamant:
Sanctus,
sanctus,
sanctus
Dominus Deus Sabaoth.
Pleni sunt cæli et terra
maiestatis gloriæ tuæ.*

*Te gloriosus apostolorum chorus,
te prophetarum laudabilis numerus,
te martyrum candidatus laudat exercitus.
Te per orbem terrarum
sancta confitetur Ecclesia,
Patrem immensæ maiestatis;
venerandum tuum verum et unicum Filium;
Sanctum quoque Paraclitum Spiritum.*

*Tu Rex gloriæ, Christe.
Tu Patris sempiternus es Filius.
Tu, ad liberandum suscepturus hominem,
non horruisti Virginis uterum.
Tu devicto mortis aculeo,
aperuisti credentibus regna cælorum.
Tu ad dexteram Dei sedes,
in gloria Patris.
Iudex crederis esse venturus.
Te ergo quæsumus,
tuis famulis subveni,
quos pretioso sanguine redemisti.
Æterna fac cum sanctis tuis
in gloria numerari.*

Vin, Dio, ni laŭdas.
Vin ni konfesas Sinjoro.
Vin, la Patron eternan,
adoras la tuta tero.
Al Vi ĉiuj Anĝeloj,
al Vi Ĉieloj kaj universaj Potencoj,
al Vi Keruboj kaj Serafoj
per voĉo senĉesa proklamas:
Sankta,
sankta,
sankta
Sinjoro, Dio de Legiaroj.
Plenas ĉieloj kaj tero
de l' majesto de Via gloro.

Vin la glora ĥoro de l' apostoloj,
Vin de l' profetoj laŭdinda aro,
Vin laŭdas de l' martiroj brilanta armeo.
Vin tra la tuta terglobo
konfesas la sankta eklezio:
Vin, la Patron de senfina majesto,
adorindan Vian veran kaj unikan Filon,
kaj la Sanktan Parakleton Spiriton.

Vi reĝo de l' gloro, Kristo.
Vi de l' Patro estas la Filo eterna.
Prenonte sur Vin, liberigi la homon,
Vi humile elektis la sinon de l' Virgulino.
Vi, venkinte la sagon de l' morto,
malfermis al la kredantoj la regnon ĉielan.
Vi dekstre de Dio sidas
en la gloro de l' Patro.
Kiel juĝisto laŭkrede Vi venos.
Vin ni petas do:
helpu al Viaj servantoj,
kiujn Vi savis per sango valorega;
ke estu ni kun Viaj sanktuloj
en eterna glor' nombrataj.

*Salvum fac populum tuum Domine,
et benedic hereditati tuæ.
Et rege eos,
et extolle illos usque in æternum.
Per singulos dies, benedicimus te.
Et laudamus nomen tuum in sæculum,
et in sæculum sæculi.
Dignare Domine, die isto
sine peccato nos custodire.
Miserere nostri, Domine,
miserere nostri.
Fiat misericordia tua Domine, super nos,
quemadmodum speravimus in te.
In te, Domine, speravi:
non confundar in æternum.*

Amen.

latina T: 4-a jarcento / ĉ. 690

Sanigu Vian popolon, Sinjoro,
kaj benu bonvole heredon Vian.
Kaj regu ilin,
kaj edifu ilin ĝis en eterneco.
Tagon post tago ni Vin gloradas.
Kaj ni laŭdas Vian nomon por-eterne
kaj de jarcentoj al jarcentoj.
Bonvolu, Sinjoro, en tiu ĉi tago
sen iu peko nin gardi.
Kompatu nin, Sinjoro,
volu nin kompati.
Venu mizerikordo Via, Sinjoro, super ni,
samkiel ni en Vi esperis.
En Vi, Sinjoro, mi esperis:
ne pereos mi eterne.

Amen.

E: Helmut Rössler 1997, 2001 en ADORU 447